

samideano formiĝis grupo kun nomo "Ĉiam Antaŭen". Ĝis la militfino okazis Esperanto-kursoj, festoj kaj teatraĵoj. Sur grupfoto el tiu tempo ni nombras 36 soldatojn kun 3 verdstelaj flagoj. Alia bildo montras 10 militistoj formantaj la komitaton.

Post tiu enkonduka kaj pionira periodo, revekigis la intereso por la mondlingva problemo. Dum 1923, S-ro Vandommele Frans, studento en brusela faklernejo, tie kontaktis esperantiston, ricevis lernomaterialon, ĝin transdonis al amiko S-ro Debrouwere Gerard en Kortrijk; tiu ŝajne sensignifa faro estis la viruso de esperantismo, kiu malrapide sed persiste etendiĝis.

Per korespond-anonceto en "Heroldo de Esperanto", n° 39 de 09.07.1926, S-ano Debrouwere G. serĉis kontakton kun la eksterlando; kolekto de tiel ricevitaĵoj pruvis la efektivan utilon de la internacia helplingvo. El individua varbado, skribaj lecionoj kaj komunikoj en la gazetaro, rezultis formigon de grupo kiu fine de 1927 jam nombris 16 membrojn. S-ano Debrouwere gvidis unuafoje kurson por la ŝkoltoj. En februaro 1928 ni notis kotizon por 20 membroj kaj komence de marto jam por 27.

La unua estraro konsistis el P.Mattelaer, prezidanto; G.Debrouwere, vicprezidanto; G.Denys, sekretario; C.Vanbiervliet, kasisto.

Enkuraĝigite pro la progreso, propaganda kampanjo en la gazetaro kaj flugfolioj preparis publikan kurson, malfermite la 28an de marto 1928 en granda salono de la urbodomo. La sukceso estis surprizo! Ne estis sufiĉe da loko por enlasi ĉiujn; 206 lernolibroj estis venditaj, necesis dividi la kurson en 2 sekcioj, kiujn gvidis S-anoj Debrouwere kaj Demey. Fine de aprilo 1928, la membronombro estis 111.

La grupo restis ĉiam tre aktiva. Ekde 1930 ĝi eldonis monatan informilon. En 1932, 5-a ekzistjaro

de la Grupo, estis organizite la 3-a kongreso de Flandra Ligo Esperantista, por kio ni disponis pri festsalono de la urba teatro. Bele ilustrita broŝuro pri Kortrijk estis eldonita. La urbestro konsentis 3.000 F da subvencio.

La Grupo tre diversflanke aktivis. Sub direkto de S-ano A.Doornaert, el Harelbeke, ĝi havis florantan kankoron, kiu prizorgis koncerton en la radio-stacio de Lille, la 12.03.1933.

Pere de la regiona radio-stacio Kortrijk, dum almenaŭ 2 jaroj, ĉiudimanĉe, je la 9-a horo, estis disaŭditaj Esperanto-kursoj kaj informoj.

Dum la monato septembro 1929, okazis granda internacia ekspozicio pri ĝardenkulturo. La organiza komitato uzis Esperanton por la eksterlanda propagando kaj nia Grupo zorgis por la tradukoj.

La semajnaj kunvenoj okazis en kafejoj "De Tuin", ĉiun merkredon. Eksterlandanoj ofte vizitis nin tie. Inter la plej konataj ni citu: en 1938 Julio Baghy, fama hungara verkisto; en 1936 Joseph Scherer, mondvojaĝanto; ankaŭ en 1936 la ĉina Pastro J.B. Kao, kiu paroladis por "Davidsfonds".

Malpermesate en 1940-45 dum la germana okupado, dum ke en la bombardita hejmo de S-ano Debrouwere multaj esperantaĵoj estis perditaj, la Kortrejkaj movado stagnaciis, sed ne ĉesis. Libro-stando en la komerca foiro de 1949 estis la signalo por nova aktiveco kaj jam en januaro 1950 nova kurso en "Middenstandshuis" komencis. Seninterrompe, la Grupo daŭre laboris kaj propagandis.

Sukcesa kulmino kaj oficiala rekono de Esperanto, estas la decido de la urbaj kaj de la bibliotekaj aŭtoritatuloj, aprobi la kreadon de speciala E°-sekcio, nomita "Fondaĵo C.Vanbiervliet", inaŭgurita la 25an de majo 1974, en ĉeesto de S-ro Dequae, prezidanto de la parlamento, de la urbestro S-ro Lambrecht, de la skabeno pri kulturo S-ro Sansen, kaj aro da aliaj eminentuloj.